

Pensoj je la naskiĝtago de L. L. Zamenhof.
Parolado por la kunv. de esp-ista klubo en Brno.
15-an de decembro 1935.

Antaŭ 76 jaroj la 15-an de decembro naskiĝis la iniciatoro de la neŭtrala lingvo esperanto d-ro Ludoviko Zamenhof. Li naskiĝis en la ruspola urbo Bialystok, kies preskaŭ 100 mil loĝantoj apartenis al 4 nacioj. La plej granda parto de la loĝantaro estis hebreoj. Krome loĝis en la urbo poloj, rusoj kaj germanoj. Kvankam la rusoj relative ne estis multnombraj, tamen ili sentis sin la mastroj, la sinjoroj de la urbo, ĉar ili ja apartenis al la reganta popolo mastrumanta la tutan regnon. Tiu ĉi fiera sento de potenco manifestiĝis per senmezuraj malestimo kaj malamikeco kontraŭ la ceteraj samurbanoj. Ja la malamikeco ofte ŝanĝiĝis en nacia, religia kaj rasa pasioj nutritaj de senrespondaj sed alte starantaj elementoj; kaj ili eksplodis de tempo al tempo en teruraj bestaĵoj kaj rabado, mortigado kaj perforto. Jen la malbonfamaj pogromoj, konataj el la rusa historio.

Zamenhof travivis tian pogromon estante infano. Teruraj estis la impresoj sur la sentema knabo, engravuritaj en lia animo, ili restis neforviŝeblaj dum lia tuta vivo. Zamenhof estis homo kreema, kiu ne kapablis indiferece rigardi la malamikajn interrilatojn de homoj apartenantaj al diversaj popoloj kaj lingvoj. Tiu ĉi maro de malamo ne infektis la noblan karakteron de Zamenhof: kvazaŭ en mirakla provujo fandiĝis la malamo kaj transformiĝis en arda deziro forigi la detruantan kaj mortigantan venenon el la reciprokaj rilatoj inter la popoloj kaj anstataŭi tiun ĉi malindan staton per stato pli nobla, pli homa: jen kiel li alvenis al sia idealo, la humaneco, kiu ĉe Zamenhof difiniĝas per la impone simpla frazo: ni estu antaŭ ĉio homoj!

Humaneco! Elparolante tiun ĉi vorton, mi devas almenaŭ mencii aliajn du virojn: nome T. G. Masaryk kaj Wilson, ankaŭ al ili plaĉis lia humaneca vivprogramo. Komuna do estis la celo, sed diversaj estis la elektitaj vojoj, por ĝin atingi. Ĉe Wilson, la estro de potenca ŝtato, manifestiĝis tiu ĉi programo per la fondo de la Ligo de Nacioj, kiu malebligu estonte ĉiujn militojn kaj ebligu pacan kunlaboron inter la popoloj. Ĝuste en la nuna tempo venis por lia kreaĵo la decida momenta, kiam pruviĝos, ĉu la Ligo iĝos senforta kaj sensignifa organizajo aŭ ĉu la Ligo fariĝos la konscienco de l'homaro. Ĉe profesoro Masaryk, kiu diris, ke la justeco estas la matematiko de l'humaneco, ĝi manifestiĝis per demokratio sur larĝa bazo de filozofio, kaj Masaryk, konstruinto kaj prezidanto de sendependa ŝtato, donis al la loĝantaro de tiu ĉi respubliko ekzemplon de modela demokrato. Kaj fine Zamenhof, la nekonata, malriĉa okulkuracisto kreis tiucele novan lingvon, per kiu li iniciatis kulturalan movadon en tia amplekso kaj larĝeco, pri kia povas fieri nur malmultaj movadoj.

Estas klare, ke movado propagandanta lingvon neŭtralan, devis kaj devas batali kontraŭ superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj, kontraŭ tradicioj kaj privilegioj de lingvoj naciaj, sed antaŭ ĉio kontraŭ la senmova kaj malpensema persistemo de popoloj. Kiu ekkomencis tiun ĉi superhoman batalon? Unu sola homo, al kiu aliĝis areto da idealistoj. Ĉu mirinde, ke ili ne venkis per unu bato? La mondo ridis kaj mokis ilin, sed la plej terura defendilo de l'mondo estis ĝia muteco. Ne, ili ne venkis la mondon, sed ankaŭ la mondo ne venkis ilin, ne rompis ilian energion, ne ŝanceligis ilian firman kredon. Hodiaŭ, je la naskiĝtago de Zamenhof, ni kun admiro memoras pri tiuj ĉi herooj de l' paco.

Tamen troviĝis ankaŭ tiam esperantistoj malpaciencaj kaj miopaj, kiuj ne vidis rokojn, kontraŭ kiuj vane ŝaŭmis la ondoj de l' komenciĝanta movado, ili ne vidis la ridindan proporcion inter la ardaj atakantoj kaj la preskaŭ nerompebla muro de atakatoj. Tro malrapide progresis laŭ ilia opinio nia movado. Ili forgesis, ke lingvo ne estas objekto, aĉetebla per mono. Lingvon oni devas lerni kaj nenion ĝenerale evitas la homo tiel, kiel ĝuste la lernadon. En ilian kapon venis la malfeliĉa penso, ke oni devas esperanton reformi, por ke ĝi estu pli akceptebla por la mondo. Ili ne konsciiĝis, ke nur en unueco ni ĝlore atingos la celon. En tiu tempo, kiam la ido de esperanto ekatakis sian patrinon, tiam kreis la franca pioniro Théophile Cart, profesoro de Politikaj Sciencoj kaj rimarkinda lingvisto la vorton: Ni fosu nian sulkon. Jes, ni fosu ĝin, ne rigardante dekstren kaj maldekstren, ni fosu ĝin de konato al konato, ni fosu ĝin, ĉiu laŭ siaj fortoj kaj kapablo en amika kaj lojala kunlaboro, kiel decas al pacaj batalantoj. Ni laboru en severa disciplino. Ni ne maltrankviliĝu, ni restu paciencaj. La tempo laboras por ni.

Brilaj elpenaĵoj de l' homa spirito igas ĉiam pli necesa lingvon neŭtralan, komunan al la

tuta mondo. Ni pensu nur pri la miraklo de nia jarcento, la radio, kiu jam de longe ĉesis esti objekto de teknikistoj kaj teknikon ŝatantaj amatoroj, kiu fariĝis grava kultura faktoro en la plej vastaj rondoj popolaj. Ne estas hazardo, ke ĝuste la radio amplekse ekuzis kaj uzas esperanton. Ankaŭ ĝia regno ja ne limiĝas je la teritorio de unu popolo aŭ lando. Ĝiaj ondoj trapenetas tutajn kontinentojn, ja la tutan mondon. Facile ili saltas trans riveroj kaj montaroj kaj landaj limoj. Tamen: antaŭ la lingvaj baroj ili devas kapitulacii. Kaj jen, radio kaj esperanto faras amikan duon kaj venos la tempo, kiam la esperanta vorto portata per ondo de radio trovos komprenantajn orelojn kaj korojn en la plej malproksimaj urboj kaj vilaĝoj. Kaj nur tiam senreste plenumos la radio sian noblan destinon kiel kultura faktoro en amplekso tutmonda.

Ni ĉeĥoslovakoj povas fieri, ke ĝuste nia stacio estis la unua, kiu ekuzis esperanton ne kiel simplan propagandan lingvon, sed kiel delikatan instrumenton alproksimigantan la korojn de l' diverspopolaj aŭskultantoj. Kaj ni esperantistoj povas fieri pri niaj eksterlandaj amikoj, kiuj rekonis la kvaliton kaj spiriton de ĝiaj elsendaĵoj donante al nia stacio la honorigan titolon La Verda Stacio.

Karaj gesamideanoj! Hodiaŭ ni kunvenis por honorigi tiun, kiu dediĉis al la lingvo internacia ĉiujn siajn fortojn kaj pensojn. Transpreninte lian heredaĵon ni plenumas la programon de la plej elstaraj spiritoj de l' historio. Alta estas la idealo, al kiu ni servas. Paca, kultura kunlaboro inter popoloj estas nia celo. Ni montru nin indaj je nia grava kaj honora tasko.

Třebíč-13-12-1935.